

Justinus Kerner,
Je la trinkglaso de mortinta amiko

tradukita de Manfred Retzlaff

Vi bela glaso, kiun li
Kun ĝojo eltrinkinta estis,
Malplena devis resti vi
Kaj tia vi jam longe restis.

Nun plenigata estu vi
Per vinbersuko, glaso mia.
Profunden enrigardas mi
En vin kun tremo pia.

Kaj kion vidas mi, ĝi ne
Al normaluloj ja nomeblas
Kaj klara estas al mi, ke
Amikoj ja ne disigeblas.

En tiu kred' eltrinkas mi,
Pokalo, ĝis la fundo vin.
En tiu kara glaso ĉi
De l' steloj or' spegulas sin.

Trankvile iras jen la lun',
La turhorloĝo min admonas,
Ke estas meza nokto nun,
En mia glaso ĝi resonas.

*Traduko de la Germana poemo "An das Trinkglas eines verstorbenen Freundes" de JUSTINUS KERNER (*1786-09-18 – †1862-02-21) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-1119-2264 (2015-01-27 16:53:26)

La germana-lingvan originalon de tiu ĉi poemo mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libreto "Ausgewählte Kostbarkeiten", kiun eldonis la eldonejo SKV-Edition, Lahr (Schwarzwald).